



Novjorka Prismo

Numero 105

Junio 2001



Esperanto Society of New York VENU AL NIA SOMERA PIKNIKO! Come to our Summer Picnic!



When: Saturday, June 16, 2001, 11 AM
(Rain date: Sunday, June 17, Statue of Alice in Wonderland, Central Park)
Call Thomas Eccardt by 10 AM if in doubt about the weather.

Where: Stuyvesant Town Oval, Manhattan, east of First Avenue and 18th Street.
The large grass Oval, never open to the public or residents, will be open for a Brass Concert, which begins at 2 PM. We will picnic on the western side. Meet at benches on the western side of the Oval, until the Oval is opened.

Bring: A blanket! Lunch, songs to sing, musical instruments to play, Esperanto poems, jokes, or short stories to read aloud, games, balls, Frisbees, etc.

Children, family, and friends are all welcome!

Protokolo de la kunveno de la 18-a de majo 2001

Je 7:04 ptm, Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon. Ĉeestis 14 personoj. Ĉeestanta la unuan fojon post longa tempo estis Renata KACZMARSKA, bibliotekistino. La protokolo de aprilo estis akceptata.

Tomaso anoncis, ke estos foiro en sia najbaraĵo la venontajn du tagojn, kaj ke la loko de lia tablo estos numero 1310 de la nord-okcidenta parto de la interna ovalo de lia apartamentaro, Stuyvesant Town, kaj ke li petas volontulojn por helpi lin. Tomaso ankaŭ montris al la klubo artikolon, kiu aperis en la *New York Times*, pri la troa uzo de la angla lingvo en Brazilo.

Rochelle F. GROSSMAN anoncis, ke Lilian RACHELE, kiu estis la kasistino de nia klubo dum multaj jaroj, baldaŭ transloĝiĝos al Oregono.

Tomaso anoncis, ke 6 personoj ricevis diplomojn de la Esperanto-klaso ĉe Stuyvesant Adult Education Center.

Alex KARKOVSKY, Rochelle F. GROSSMAN, kaj Nijl BLONSTEIN estos la tri kunlaborantoj de la Kandidatiga Komitato de ĉi tiu jaro.

La kluba pikniko de ĉi tiu jaro okazos je la 16-a de junio, apud la statuo de Alice in Wonderland en Central Park. [Post la kunveno oni elektis novan lokon en Stuyvesant Town; vidu la detalojn en la anonco.]

Proponoj por lokoj por niaj someraj renkontiĝoj estis: vizito al la Ĉina Ĝardeno ĉe Staten Island, boat-vojaĝeto je la

Circle Line ĉirkaŭ Manhattan, vizito al la UN ĝardeno, vizito al la Holokaŭsta Muzeo, neformala kunveno ĉe K-Mart, poshtagmezo ĉe Fort Tryon Park, kaj vizito al South Street Seaport.

Nijl montris al la klubo leteron al la redaktoro kaj artikolon, kiuj aperis en la *New York Times*.

Je 7:54 ptm, Tomoko YAMASHIRO komencis prelegon pri la komunumo de Okinaŭanoj en Bolivio. Tomoko diskutis pri la historio de la insulo Okinaŭo, kies pli malnova nomo estis Ryukyu. Ŝi montris malsamecojn inter la okinaŭa lingvo kaj la japana lingvo. Ŝi diskutis pri la rilatoj inter Okinaŭo kaj Ĉinio, kaj pri la rilatoj inter Okinaŭo kaj Japanio. Tomoko parolis pri sia edukado ĉe lernejoj en Bolivio, kie ŝi lernis la hispanan, la anglan, la francan, kaj eĉ la japanan.




Tomoko prelegas pri Okinaŭo

Je 8:39 ptm, Tomoko finis la prelegon, kaj Rochelle prezentis al Tomoko ekzempleron de la libreto *Doctor Esperanto, Man Full of Hope*. Post la prezentado, Tomoko respondis al demandoj de la ĉeestantoj.

Je 8:48 ptm, Tomaso oficiale fermis la kunvenon. Tuj poste, kelkaj personoj iris al la restoracio My Cousin Vinny's por manĝi kaj trinki. ★
Protokolis: Stuart GREEN

How to get to the picnic . . .


Take subway to Union Square or 23rd Street and walk east, or take L train to First Avenue. Bus: M14 (14th St.) or M23 (23rd St.) to First Ave., or M15 north (1st Ave.) or south (2nd Ave.).



In case of rain, the picnic will be held on Sunday, June 17, at the statue of Alice in Wonderland in Central Park, just north of the Conservatory Water.

NOTE: We do not meet again at UFT until September. Come to the picnic and to our other New York area get-togethers this summer (see page 2). ★

Stuy Town Flea Market



Emily, Nancee, Tom kaj Nijl ĉe la Pulmerkato.

UEA/NY

La 31-an de majo mi ĉe-estis kunvenon pri *Conflict and Reconciliation: The Role of Religious Communities*, konvokita de la NRO Komitato pri Libereco de Religio aŭ Kredo. Gvidis la kunvenon Nikoo Mahboubian (Bahá'í Internacia Komunumo). Prelegis ĉ-ro Andrea Bartoli, direktoro de la programo pri internacia konflikt-dissolviĝo ĉe la School of International and Public Affairs, Columbia University. Ĉ-ro Bartoli klarigis pri teamo, kiu helpis en sep nacioj, inter aliaj Mozambiko, Kosovo, Orienta Timor. Li detale parolis pri la laboro en Mozambiko kaj kiel oni atingis pactraktaton. ★

— Rochelle F. GROSSMAN

Bakteriaj konspiroj

En la revuo *Natural History* (5/01) mi hazarde rimarkis artikolon de Bonnie L. Bassler titolita *Tiny Conspiracies: Cell-to-Cell Communication Allows Bacteria to Co-ordinate their Activity*. Post longa scienca diskuto, imagu mian surprizon, kiam mi legis la jenan frazon: "Different species may be able to communicate with one another using a common 'language,' a bacterial Esperanto." ★

— Rochelle F. GROSSMAN

NPR

La 21-an de majo mi aŭdis raporton pri Esperanto ĉe National Public Radio. Post granda reago al antaŭa programo pri Esperanto, NPR donis tempon al Bill Harmon, usona ĉefdelegito de UEA. Bill parolis pri Pasporta Servo, pri sia ofta kontakto kun japanaj esperantistoj dum sia loĝado en Japanio, kaj pri vizitoj al esperantistoj en Alĝerio dum sia milit-servo. Mi poste gratulis Bill telefone. Li menciis, ke kiam la ĵurnalisto demandis "ĉu esperantisto havas alian ideologion krom la lingvo?", li respondis 'ne'. Laŭ mi, li emfazis la periodon de Makartismo, kiam politiko vundis ankaŭ la Esperantan movadon en Usono, kaj li preferis reagi per emfazo de neutraleco. ★

— Nijl BLONSTEIN

Ĉu via lasta Prismo?

Antaŭnelonge, la estraro de ESNY decidis sendi sian novaĵ-leteron nur al homoj kaj grupoj, kiuj resendas la verdan slipon (aliĝilon). Espereble tio helpas nin direkti *Prismo* al la homoj, kiuj plej ĝuas ĝin. Do en septembro, se vi ankoraŭ ne resendis la slipon, anstataŭ ekzempleron de *Prismo*, vi ricevos leteron, kiu klarigos kiel vi povas renovigi vian abonon. ★

— Tom ECCARDT

Marta eŭropa vojaĝo III

Ni baldaŭ alvenos hejmen — ni atingas la finan ĉapitron de la "taglibro" pri mia marta vojaĝo en Eŭropo. Strasburgo estas la nomo de la franca urbo, kiun mi menciis en la dua epizodo: ĝi situas proksime de la landlimo kun Germanio, kaj dividas iom de la germana kulturo kaj lingvo. Tie estas granda katedralo, bela parko kun birdoĝardeno, k.t.p., sed ankaŭ ekzistas nova kvartalo, kie troviĝas la registaro de Eŭropa Unio, ĉar Strasburgo estas unu el du ĉef-urboj de la nova Eŭropo.

Post Strasburgo, mi vojaĝis al la Granda Duklando, Luksemburgo. Kiam mi alvenis, vespere, la vetero estis malvarma kaj neĝis. Sed la sekvontan tagon, la suno eliris kaj mi spertis belajn vidaĵojn ekde la supraj partoj de la ĉefurbo, ankaŭ nomata Luksemburgo. En Luksemburgo, oni parolas la francan, la germanan, kaj la luksemburgan. Tamen mi vidis ŝildon sur kosmetik-vendejo en la angla lingvo: BEAUTY FREE. Mi eniris por klarigi, ke tiu esprimo sonas iomete strange, iom kontraŭ la celo de kosmetikoj. Sed dungitino klarigis, ke BEAUTY signifas la specon de la vendejo, kaj FREE signifas, ke "on peut y circuler librement." Mi konkludas, ke foje estas danĝere, kiam oni libere kombinas vortojn prenitajn de alia lingvo, kies signifo povas esti malsamaj — la kombinaĵo povas havi tute neatenditan signifon!

De duklando mi iris al reĝlando por viziti mian eks-kunloĝanton, Claudio, en lia hejmo en Amsterdamo. Tie mi ankaŭ vizitis la kaŝejo de Anna Frank apud la preĝejo Westerkirk. Oni konstruis interesan muzeon ĉe ĝia flanko, sed bedaŭrinde ĝi forprenas iom de aŭtentikeco, kiam vi vidas ĝin de ekstere, laŭ mia opinio. Mi tagvojaĝis ankaŭ al Roterdamo por viziti la sidejon de UEA. La domo estas sufiĉe granda kun eble ses etaĝoj, kun oficejoj, eldonejo, biblioteko, kaj librovendejo. Ĉiuj parolis Esperante kaj tre ĝentile montris al mi ĉion. Alian tagon mi, Claudio, kaj lia familio vizitis Zaanse Schans, tradicia nederlanda vilaĝo kun fromaĝ-farejo, ligno-ŝu-farejo, kaj kompreneble multaj ventmueliloj. Mi ankaŭ havis okazon viziti psikolingvistikan laboratorion en Nijmegen.

Post nostalgiaj tagoj kun mia kunloĝanto en Amsterdamo, mi reiris aviadile al Londono. Tie mi vizitis la jurisman kvartalon de Londono, nomata "the Temple". Mi imagis vidi "Rumpole of the Baily" rapidi de unu malnova konstruaĵo al alia. Antony

ESNY SUMMER CALENDAR 2001

The following Esperanto get-togethers will take place this summer. For more information, directions, etc. contact Thomas Eccardt, or one of the other officers listed below.

June 16, Saturday, 11 AM

Stuyvesant Town Oval

Our annual ESNY picnic — see the announcement and directions on page 1.

July 1, Sunday, 1 PM

United Nations Gardens

Visit/picnic at the UN Gardens. Meet at 777 UN Plaza, ground floor. Rochella will guide us through the gardens and UN buildings if open.

July 24, TUESDAY, 6 PM

"Ballet Tech" in the Winter Garden at the World Financial Center (West of the World Trade Center.)

Free performance starts at 7:00 PM.

"Ballet for today — fast, sexy, multi-racial, exuberant, and PHAT!" We'll meet as close to the outside entrance as possible.

August 5, Sunday, 12:30 PM

Chinese Scholar's Garden at the Staten Island Botanical Garden

Only authentic Ming-style garden in the US. Meet at the Staten Island Ferry terminal (middle benches) before 12:30 PM when the ferry leaves. We will then take bus S40. Call 718-273-8200 for instructions by car to 1000 Richmond Terrace, Staten Island. Admission is \$5 for adults, \$2.50 for children, \$4 for seniors, and \$15 for families of up to five. Will investigate possibility of group rate.

August 17, Friday, 6 PM

South Street Seaport

Water & Fulton Streets, lower Manhattan. Meet at the Titanic Memorial Lighthouse at Water and Fulton Streets. After meeting, we'll visit shops and then have dinner on the pier.

September 2, Sunday 1 PM

Fort Tryon Park, Upper Manhattan

A Train to 190th Street or M4 Bus to Margaret Corbin Plaza (Fort Washington Ave. near 193rd St.). Follow Park Drive, north, to the Fort Tryon Cafe, where we'll meet. After lunch, those who wish can visit The Cloisters.

September 21, Friday 6:30 PM

United Federation of Teachers

Next regular ESNY meeting. 200 P.A.S. Come hear about the summer's Esperanto conferences and tell us about your summer! ★

Rawlinson bonkore gastigis min en Londono ankoraŭfoje kaj veturigis min al la trajnstacidomo. Flugante hejmen, mi vidis Bostonon sub la aviadilo kvazaŭ sur mapo, sed mi povis vidi konstruaĵojn samtempe. Mi esperas, ke vi ĝuis la raportojn pri mia vojaĝo — dum aŭtuno mi kunportos al klubkunveno vidbendon de la sidejo de UEA en Roterdamo. ★

— Tom ECCARDT

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017

(212) 687-7041

http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Korespondanta Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Smart Green
(631) 751-5683

Vicprezidanto
Thomas Leong
(718) 981-4252

Kasistino
Sofiya Soskina
(718) 671-5699

Program-Direktorino
Susan Kohn
(212) 226-0443

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano
Sendu kontribuojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com
© 2001 Esperanto Society of New York

Novjorka Prismo

Numero 105 — Junio 2001

ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

Desegnistino
Mary Pulley